# Persone, Kiam Amo Regas

Mi ne vidis in dum jaro
Sed hiera in renkontis en la stratangulo
i brakumis min modere
Kaj mi tuj komprenis: Nun i havas amatulon

Sed u tio estas kazo desaponti min?
u i vere perdis emon plu renkonti min?

Kien iru amikeco kiam amo regas?
Kie estas lok' por i?
Kien iru amikeco kiam amo regas?
u ne estas lok' por tri?

Ni kuniris la la strato
Parolante pri nenio per surfacaj frazoj
Amikeco ne eternas
i aperas kaj perdias tra la vivaj fazoj

Kaj se amo devas gardi kaj protekti sin
Amikeco devas kai kaj neglekti sin

Kien iru amikeco...

Kien iru amikeco...

Hej, hej! Kien iru amikeco kiam amo regas?
Kie estas lok' por mi?
Kien iru amikeco kiam amo regas?
u ne estas lok' por tri?